**Komitato de ISAE 1953-1955.** Aŭstrujo: prof. H. Sirk. Francujo: inĝ. E. François kaj inĝ. C. Naoumoff. Germanujo: inĝ. R. Haferkorn. Japanujo: d-ro S. Nishi. Jugoslavio: prof. B. Popović. Nederlando: d-ro inĝ. G. Hamming kaj d-do G. F. Makkink. Norvegujo: s-ro C. Støp-Bowitz, Svedujo: inĝ. S. Alexandersson, anstataŭanto s-ro B. E. Jernberg.

Krome apartenas al la Komitato: prof. M. Fréchet (eksprezidanto), d-ro W. P. Roelofs (redaktoro de Scienca Revuo), d-ro I. Lapenna (delegito pri informado).

En multaj landoj la membroj ankoraŭ ne elektis komitatanon. La delegitoj en tiuj landoj estas petataj aranĝi elekton por ke la Komitato fariĝu pli granda kaj reprezenta kaj ni havu pli da kandidatoj por estontaj elektoj.

**Kotizoj 1954.** La kotizo por aktiva membro (kun abono de Scienca Revuo) estas: Argentino 25 pesoj, Aŭstrujo 35 ŝilingoj, Belgujo 85 frankoj, Brazilo 30 kruzejroj, Britujo specialaj kotizoj, Danujo 12 kronoj, Finnlando 400 markoj, Francujo specialaj kotizoj, Germanujo 7 markoj, Hispanujo 65 pesetoj, Italujo 1000 liroj, Japanujo 600 jenoj, Jugoslavio 500 dinaroj, Meksikio 14 pesoj, Nederlando specialaj kotizoj, Norvegujo 12 kronoj, Svedujo 9 kronoj, Svisujo 7.50 frankoj, Usono 2 dolaroj. En aliaj landoj egalvaloro de 12 anglaj ŝilingoj.

Por aprobanto sen Scienca Revuo la kotizo estas 2 anglaj ŝilingoj aŭ egalvaloro.

Bonvolu pagi tuj al via delegito. Sven Alexandersson.

061.3(100)„1954" : 378.938

## 14a INTERNACIA KONGRESO DE EKSSTUDENTOJ DE LA SUPERA KOMERCA INSTRUADO.

Ĉu vi estas eks-studento de supera komerca lernejo?

Se jes, interesas vin scii, ke la problemo de la Internacia lingvo estos unu el la temoj de la 14a Internacia Kongreso de Eks-studentoj de la Supera Komerca Instruado, kiu okazos en Lyon, Francujo, de la 26a de junio ĝis la 4a de julio 1954.

Pli ol ducent asocioj el la tuta mondo sendos delegitojn al tiu Kongreso, kiu celas organizi la kunlaboradon de eks-studentoj de la Supera Komerca Instruado sur praktikaj fundamentoj.

Tre dezirinde estas ke multaj Esperantistoj partoprenu kondiĉe ke ili mem estu eks-studentoj de iu Supera Komerca Lernejo.

Interesatoj bonvolu tuj skribi al Richard LEVIN, Président de l'Association des Anciens Elèves de l'Ecole Supérieure de Commerce de Lyon, 34, rue de la Charité, Lyon, indikante en kiu Sup. Komerca Lernejo ili lernis, de kiu dato al kiu dato tio okazis, kaj kiun diplomon ili ricevis ĉe la fino de la studado.



## ENKETO PRI ESPERANTO EN SCIENCAJ KAJ FAKAJ GAZETOJ NE-ESPERANTISTAJ.

La Centro de Esploro kaj Dokumentado en kunlaboro kun ISAE enketas pri la uzo kaj la ebloj uzi Esperanton en ne-esperantistaj fakaj (sciencaj kaj teknikaj) gazetoj. La rezulton de ĉi tiu enketo publikigos Scienca Revuo. La celo de ĉi tio estas duparta. Unuparte per tio ni informos la fakulojn en kiuj fakaj gazetoj ili eventuale povos esperantlingve publikigi la rezultojn de sia laboro, kaj aliparte la rezulto de ĉi tiu enketo povas esti plua argumento, plua armilo kiu helpos nin fari novajn konkerojn, armilo kiu eble povos utili jam en 1954 en Montevideo. Tial *rapida* laboro estas necesa. Ĉiuj kiuj povas kolekti kaj doni informojn, skribu al D-ro W. P. Roelofs, Redaktoro de Scienca Revuo, Kerkpad zz 53, *Soest*, Nederlando; Japanoj informu pere de profesoro S. Nishi. Informu pri:

plena nomo de la gazeto (eventualo kun traduko de la nomo), adreso de la redakcio, nomo kaj adreso de la eldonanto; fako(j) traktata(j); kategorio.

Ni dividas la gazetojn en diversajn kategoriojn, jene:

A: tiuj kiuj jam publikigis artikolojn en Esperanto (se eble indiku ekzemplojn);

B: tiuj kiuj jam aperigis nur resumojn en Esperanto (aldonitajn, aŭ ne, al alilingvaj artikoloj) (se eble indiku ekzemplojn);

C: tiuj kiuj aldonas esperantlingvajn resumojn al ĉiuj alilingvoj artikoloj, prefere kun indiko depost kiam ili tion faras;

D: tiuj kiuj (ankaŭ) nun pretas akcepti artikolojn en Esperanto;

E: tiuj kiuj pretas allasi *nur* resumojn en Esperanto, aldonitajn al kiulingvaj [1]) artikoloj;

a: tiuj kiuj postulas ke aŭtoroj estu ano de iu societo, instituto aŭ alia organizajo, kaj/aŭ abonanto de la koncerna gazeto ;

b: tiuj kiuj ne faras tiajn postulojn.

Eblas do jenaj kategorioj: Aa, Ab, ACa, ACb, ADa, ADb, AEa, AEb, Ba, Bb, BCa, BCb, BDa, BDb, BEa, BEb, Ca, Cb, CDa, CDb, Da, Db, Ea, Eb.

Ekzemplo: Koninklijke Nederlandse Akademie van Wetenschappen, Proceedings of the Section of Sciences; Redakcia adreso: Trippenhuis, Amsterdam, Nederlando; Eldonisto: N.V. Noord-Hollandse Uitgevers-Maatschappij, N.Z. Voorburgwal 68-70, Amsterdam C; UDK 5/6; B (**51** [1948] 154, 532, 792, 1221, 1231) E (A, F, G) b (membro de la akademio devas proponi akcepton de artikolo de eksterulo).

Klarigo: UDK 5/6 signifas ke la gazeto temas nur pri matematiko, natursciencoj kaj tekniko inklude medicinon.

Mi petas ĉies kunlaboron. Rapida helpo estas duobla helpo!

W. P. Roelofs.

[1]) A=angla; F=franca; G=germana; H=hispana; I=itala; J=japana; P=portugala; aliajn lingvojn indiku en klara maniero.